



Kroniko

Jaro 2012



Pola Esperanto-Asocio
Filo Gliwice

Novjara renkontiĝo de esperantistoj



La 28an de januaro 2012 okazis nia tradicia novjara renkontiĝo de esperantistoj. La kunveno komenciĝis je la horo 10.30 en sidejo de nia klubo. En ĝi partoprenis ĉirkaŭ 30 esperantistoj el proksimaj urboj: Gliwice, Zabrze, Bytom, Katowice, Kędzierzyn-Koźle kaj Jaworzno. Ni gastigis ankaŭ eksterlandanojn - esperantistojn el Ĉeĥio, el Ostravo.

Prezidanto de nia filio Stanisław Mandrak salutis partoprenantojn kaj deziris al ĉiuj ĉion bonan en Nova Jaro 2012.

Dum nia renkontiĝo ni kantis esperante pastoralojn, manĝis kukojn, trinkis kafon aŭ teon, kaj multe babilis.

Unu el niaj ĉeĥaj amikoj estas redaktoro de nova ostrava esperanta radio "Verda stacio". Li prezentis ĝin kaj registris fragmentojn de nia kunveno. Vi povas aŭskulti "Verdan stacion" en la paĝo: www.verdastacio.eu.

Novjara renkontiĝo estis tre agrabla kun familia etoso. La organizantoj invitas ĉiujn venontjare.



Nova germana esperanta radio



Karaj gesamideanoj!

mi invitas vin elkore sekvi nian duan RADIOELSENDON EN ESPERANTO sur la ondoj de la radiostacio Radio FREI en Erfurto (Germanio). Ni disaŭdigos ĉiun unuan dimanĉon po monato je la horo 9-a vespere (laŭ centreŭropa tempo). La sekvonta elsendo estos en la 4-a de marto inter la horoj 21-22.

Jen la programo:

- * Lokaj novaĵoj el la erfurta regiono (kun mallonga resumo en la germana).
- * Leterkesto de la geaŭskultantoj: en esperanto kaj en la germana (depende de la adresinto). Tie oni ne nur respondas al la leteroj, sed ankaŭ pridiskutos la rolon de Esperanto kaj klarigos pri tiu temo.
- * Rubriko "Erfordiensia" (ekz. pri vidindaĵoj, historiaj aferoj, personoj interesaj; elstaraj eventoj).
- * Lingvokurso por komencantoj (laŭ la libro "Mia serurtruo" de Josef Schiffer).

Nia programo rekte aŭskulteblas sur frekvenmodulado 96.2 MHz en la erfurta regiono kaj tutmonde interrete sub www.radio-frei.de/player/flash/flplayer.html. Pliaj informoj pri la radiostacio disponeblas ĉe:

eo.wikipedia.org/wiki/Radio_F.R.E.I.

Bv. adresi viajn leterojn al la EO-redakcio: Esperanto@radio-frei.de.

Mi petas ankoraŭ al vi transsendi tiun ĉi retpoŝtleteron al ĉiuj de vi konataj geesperantistoj, kiuj eble interesiĝus pri radioaŭskultado esperanta. Eble publikigu ĝin ankaŭ en surinterretaj novaĵgrupoj. Dankon anticipe.

Afable, Bernhard Schwaiger (Respondanto de la EO-elsendo)

Jubileo de Pola Retradio - aŭdu ĝin!

Vendrede, la 2-an de marto Pola Retradio en Esperanto festis jubileon okaze de la **100-a disaŭdigo**.

Ni glivice'aj esperantistoj gratulas al la tuta kolektivo de la radiostacio.

Vi povas aŭdi ĝin sur la paĝo: retradio.posterous.com

Esperantisto el Brazilo en Gliwice

Marte 2012 alvenis al Gliwice Marlon, juna esperantisto el Brazilo, precize el ĉefurbo de la lando. Li estas bona esperantisto, konas kelkajn lingvojn kaj sufiĉe bone parolas pole. Ĉiumarde li partoprenas niajn kunvenojn. Li estas tre simpatia kaj glivice'aj esperantistoj akceptis lin kiel ano de nia klubo.

La 21an de marto, dum nia kunveno Marlon tre interese rakontis pri sia aventuro kun Esperanto kaj pri Esperanto-Movado en Brazilo.



Esperanto-Sumoo

Jam finiĝis **la 15a Internacia Esperanto-Sumoo**, kiu daŭris ekde la 11a ĝis la 25a de marto 2012. En ĉi tiu marta sumoo partoprenis 112 luktistoj el 21 landoj kaj tralegis entute preskaŭ 10000 paĝojn. Ankaŭ 4 geesperantistoj el nia klubo partoprenis en ĉi tiu konkurso de legado esperantajn librojn. Ili ĉiuj akiris 15 venkojn kaj ricevis diplomojn.



Pasko en nia klubo

La 11an de aprilo 2012 ni renkontiĝis en festa paska etoso. Ni manĝis cukerajn ovojn, paskan kukon kaj babilis pri paskaj kutimoj en niaj familioj. Dum la kunveno estis tre agrable kaj gaje.



Renkontiĝo en Ostrava

Dum oblata renkontiĝo en Gliwice ni estis invititaj viziti ĉeĥan urbon Ostrava. Do, **merkrede la 25-an de aprilo 2012**, forta 8 persona grupo de gliwice'aj esperantistoj partoprenis kluban kunvenon en urbo Ostrava. Ostravaj esperantistoj gastigis nin kiel reĝoj, tion oni povas vidi sur la fotoj. La renkontiĝo pasis en bona amika etoso. Ni babilis pri diversaj temoj interalie pri sekvontaj esperantaj renkontiĝoj. La plej grava kunveno okazos junie sur lima monto Ĉantorio. Oni povas supozi ke post nia vizito en Ostrava niaj rilatoj estiĝos pli fortaj kaj niaj gekolegoj de ambaŭ flankoj tre volonte renkontiĝos denove. Ni dankas al vi karaj gekolegoj el Ostrava pro invito kaj pro la renkontiĝo.



Promocio de Esperanto en Albanio

En la tagoj 14-21 de aprilo 2012 en Albanio gastis grupo de polaj esperantistoj, kaj inter alie estis prezidanto de nia grupo Stanislavo Mandrak. Dum unu semajno polaj esperantistoj, unu Svedo kaj unu Latvino povis renkontiĝi kun loka (Tirana) esperanta movado kaj la motoro de tiu movado s-ro Bardhyl Selimi. La ĉefa programo estis ligita kun la eldono de monde konata albana verkisto Fatos Kongoli de lia libro "Hunda haŭto" en esperanta lingvo. Kvankam la aŭtoro komence dubis pri la senco de esperanta traduko, sed fine konsentis pri tiu propono, kiun faris bonege Tomasz Chmielik. Kvankam aperis diversaj problemoj, speciale trovi sponsorojn, sed fine de pasinta jaro esperanta versio de la libro povis aperi. La tutan aferon kaj la alvenon de nia grupo gvidis nia albana amiko Bardhyl. Apero kaj promocio de la libro de Fatos Kongoli okazis granda promocio de la lingvo esperanto. Esperantistoj estis akceptitaj de la prezidanto de Akademio de Sciencoj kies membro estas mem verkisto Fatos Kongoli. En granda salono de Akademio okazis granda promocio de la libro. Krom membroj de la Akademio venis politikistoj, verkistoj, diplomatoj kaj lokaj esperantistoj. Venis ankaŭ multe da ĵurnalistoj kaj kelkaj televiziaj raportistoj kun kameraoj. Pri tiu evento skribis pli ol 10 ĵurnaloj kaj televizia kanalo "Albanian Screen" faris 50-minutan intervjuon kun internacia grupo de esperantistoj. Konata albana aktorino kiu gvidis la programon preparis la interesajn demandojn pri esperanto kaj esperanta kulturo. La tutan vigle tradukis nia invitinto s-ro Bardhyl. Nia grupo estis ankaŭ akceptita en Ministerio de Kulturo kaj Turismo kaj poste en Fakultato de Fremdaj Lingvoj de Tirana Universitato. Ĉiuj: Dekano de Fakultato kaj pli ol cent gestudentoj sciigis pri esperanto kaj ĝia kulturo. S-ino Jolanta Kieres faris dudekkelminutan bazan provlecionon laŭ rekta metodo. Niaj gastamaj esperantistoj organizis por ni kelkajn ekskursojn. Ni povis vidi la panoramon de Tirana el monto Dajti. Ni vidis plaĝojn kaj marhavenan urbon Durres kun la plej granda amfiteatro en Balkanio. Parton de albana historio montris al ni urbo-muzeo Berat kun sia 2400 jara

historio. Urbo Kruja naskiĝloko de fama albana heroo Skanderbeg kun sia pitoreska bazaro restos longe en la memoro de partoprenantoj.

Vidis kaj mallonge raportis Stanislavo Mandrak



Komuna Esperanto-Kongreso en Berlino

De la 25a ĝis la 28a de majo 2012 en la jarcenta ĉefurbo de Germanio, Berlin, okazis la germana-dana-pola Komuna Esperanto-Kongreso (KEK2012), subtitole "Partneroj en Eŭropo", kiu estis ankaŭ modesta Pola Esperanto-Kongreso.

La du elektitaj kongresejoj troviĝas en la agrabla kvartalo Lichtenberg - kernejo de Esperanto-movado kaj unu el la 12 urbodistriktoj en Berlin. En la najbara renkontiĝdomo "Oranĝerio" eblis ĉeestadi en la dumtagaj prelegoj kaj kunsidoj. Vespere la partoprenantoj spektis teatraĵojn kaj koncertetojn en "Max-Taŭt-Aŭlo".

Substreki gravas, ke unuafoje en historio de Esperanto-movado en ĉi tiuj tri landoj realiĝis tia samideana kunveno. Indas ankaŭ menci, ke ne nur danoj, germanoj kaj poloj rendevuis tie, sed tamen brazilanoj, italoj, angloj, francoj kaj ĉinoj.

Vendrede je la 20a horo vespere la kongreson malfermis oficiale sinjoro Martin Haase, profesoro pri lingvistiko en la universitato de Bamberg kaj estro de la Germana Esperanto-Instituto, per festprelego "Partneroj en Eŭropo".

Sekve, denaskulo dana muzikisto Kim Henriksen prezentis kun pola koruso el Nowy Sącz kaj belegajn kanzonojn kaj la Eŭropan himnon esperante, proponitan al EU kiel oficiala himno la 2an de majo ĉijare.

Sabaton matene kaj posttagmeze oni gvidadis plurajn prelegojn, parolante pri ĝemelurbaj projektoj, spertoj de partnereco, interkultura edukado, Esperanto-disvastigantaj klopodoj ktp.

Dimanĉon posttagmeze, samtempe okazis tra interesaj kaj vizitindaj lokoj en Berlin kelkaj ekskursoj. Oni devis laŭ siaj interesoj decidi en kiu programiĝo partopreni.

Lundon matene aliaj prelegoj estis gvidataj, kaj post tagmanĝa paŭzo je la 14a horo oni efektivigis la solenan fermon de la Komuna Kongreso, kio en ĉiuj sensoj estis granda sukceso kaj multe plaĉis al la partoprenantaj esperantistoj.

Ankaŭ ludoj, instruado, kaj omaĝoj gajnis spacon en la programo de la kongreso. Dum la kvar tagoj, funkciis la esperantista libroservo, kie la samideanoj povis malmultekoste aĉeti verkaĵojn de la riĉa kaj rapide kreskanta Esperanto-literaturo. Krome, al ĉeestantoj


eblis mendi bongustajn kaj malmultekostajn germanajn manĝaĵojn en bufedo surloke. Fratema atmosfero regis en la renkontiĝo, speciale rimarkebla dum interprelegaj paŭzoj, kiam ĉiuj ĝoje babladis, libere blagadis, kaj kune faradis fotojn, eĉ ĵus konatiĝitaj homoj, kvazaŭ malnovaj amikoj. Tial montritas, ke Esperanto atingadas sian ĉefan celon - interhomara unuigo. Longe vivu la internacia lingvo!

Priskribis Marlon Ribeiro

En Komuna Esperanto-Kongreso partoprenis 5 esperantistoj el nia glivice'a klubo. Ni veturis al Berlino per komuna buso. La vojaĝon organizis la eksprezidantino de PEA Halina Komar. Nia grupo loĝis en agrabla hoteleto "Holi", kiu troviĝas en kvartalo Lichtenberg. Dimanĉe estis aranĝita ekskurso al Potsdam, kie ni vizitis belegan parkon kaj palacon Sanssouci.

Ni estas tre kontentaj de nia restado en Berlino kaj ni tre dankas al Halina Komar pro bona organizado de nia komuna vojaĝo.

Salutas vin amike - Natalia Grochocka



Ĉantorio 2012



Tradicie **la 3-an dimanĉon de junio (la 17-a de julio 2012)** polaj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj renkontiĝis sur ĉeĥo-pola lima monto Ĉantorio. La monto situas en montaro Beskid Śląski (Silezia Beskido). Alteco de la pinto estas 993 m super la marnivelo. Ĉe pola flanko en urbo Ustroń estas instalita tre oportuna por turistoj telfero kiu gvidas al la pinto. De finstacio de la telfero la pinton oni konkeras per duonhora pieda marŝo.

Tiu ĉi jare vetero estis tre bona. Suno brilis kaj vento blovetis. Ne nur vetero estis konvena, ankaŭ trajno per kiu ni vojaĝis el Gliwice al Ustroń, estis pli moderna kaj pli komforta. En la trajno funkcis klimatiza instalaĵo. Alia surprizo atendis nin en pinta ĉeĥa kabano kies tabloj kaj seĝoj estis ŝanĝitaj. Nova meblaro estas pli bela kaj pli luksa. Manĝi, trinki drinki kaj babili ĉe la tabloj estas vera ĝojo.

Bedaŭrinde tiu ĉi jare ne partoprenis slovakoj, malmultnombraj estis ĉeĥoj (5 personoj). Entute estis 29 personoj. La partoprenatoj ricevis senpage insignon pri la renkontiĝo. Ĝin projektis nia koleginino Krystyna Grochocka kaj sponsoris nia kolego Stanisław Mandrak. La insigno estas bela rememoraĵo el la renkontiĝo.

Aleksander Zdechlik



Ĉu vi jam estis en Mielno?



Esperantistoj el kelkaj landoj, elektis Mielnon por sia tradicia printempa renkontiĝo. En tiun ĉebaltan lokon, proksime de Koŝalin, pli ol 80 esperantistoj en la tagoj 12-23 de junio venis ne nur por ripozi, sed ankaŭ kaptis la okazon por renkontiĝi kun novaj kaj malnovaj ŝatantoj de "Mielna printempo" dum la 34-a ĈEP. Ĝuste antaŭ 125 jaroj Ludoviko Zamenhof dediĉis al la homaro ilon por komuna kaj facila interkompreniĝo. Amikeco kaj interkompreniĝo regis ankaŭ en Mielno.

Feriado en Szczawno Zdrój

Okaze de la 125 - jara jubileo de Esperanto kaj la 100a datreveno de restado de Ludoviko Zamenhof en Bad Salzbrunn (Szczawno-Zdrój), Silezia Esperanto-Asocio organizis Esperantistan Feriadon en Szczawno-Zdrój **ekde la 5a ĝis la 12a de aŭgusto 2012.**


Szczawno-Zdrój estas kuracloko kun 6 mil da loĝantoj. Ĝi estas situata en la montaro Sudety apud urbo Wałbrzych.

La ĉefa loko de la feriado estis la ripozdomo MAGNOLIA. Proksime al MAGNOLIA troviĝas la vilao FRANCISZEK, kie en la 1912 jaro loĝis L. Zamenhof. Dimanĉe la 5an de aŭgusto okazis malfermo de memortabulo al Zamenhof sur muro de la vilao FRANCISZEK.

Organizantoj organizis riĉan programon: prelegojn, kursojn, filmojn kaj ekskursojn. Ni vizitis palmejon en Lubiechów, Parkon pri Miniaturoj en Kowary, turon en Siedlęcín kaj valon de rivero Bóbr. Estis diversaj kulturaj programoj. Okazis koncerto de JoMo kaj de Manuel Rovere en koncertejo en kuracloka parko. Ni havis renkonton kun Roman Dobrzyński - konata pola esperantisto kaj ĵurnalisto. Vespere ni kantis esperante, kaj havis eblecon danci en kafejo.

Ni estis kontentaj pro la komuna pasigita tempo.

Raportis - Barbara Gut



Jadwiga Gibczyńska



Antaŭ kelkaj semajnoj (13.07.2012) mortis en Krakovo eminenta esperantistino, fama aktorino **Jadwiga Gibczyńska**. Ŝi estis tre aktiva esperantistino kaj mondkonata. Estis Honora Membro de UEA kaj tre aktiva en Krakovo medio. Estis ankaŭ honora membro de esperantista grupo en Gliwice, kie kelkfoje prezentis siajn teatraĵojn. Inter alie dum GRUPE en la jaro 2000 ŝi prezentis la dramon "Signaloj" de Johano Paŭlo la II-a. Por spektantoj estis granda travivaĵo, dum kiu s-ino Jadwiga transdonis per sia ludo majstre la pensoj de la aŭtoro.

La lastan fojon ŝi prezentigis en Gliwice en la jaro 2008. Ĉe ni restis nur kelkaj fotoj de ŝia lasta restado en Gliwice. Jam ni ne plu petos ŝin veni al nia urbo. Granda perdo ne nur por la glivice'aj esperantistoj.
Ripozu en la paco!

Jadwiga Gibczyńska dum GRUPE 2008



Evento en esperanta monado

La 1-an de oktobro 2012, mia kolego, amiko kaj ankaŭ mia unua instruisto de la lingvo Esperanto, Antonio Jerzy Walaszek estis dekorita de la Silezia Vojevodo per Ora Kruco de Merito. La distingo, kiel esprimis Vojevodo, estas aprobon al lia multjara, poresperanta agado kaj pro ĝia evoluigo en Pollando.

Solenaĵo okazis en Marmora Salonego de Vojevoda Oficejo. Post oficiala programo estis okazo interŝanĝi kelkaj vortoj kun Vojevodo pri Esperanto, kaj fine Antonio Walaszek salutis lin en la nomo de ĉiuj esperantistoj el Supra Silezio.
Elkorajn salutojn Kara Antonio kaj pliajn sukcesojn!

Bohdan Rudawiec



79a Esperanto-Kongreso en Italio

De 18a ĝis 25a de aŭgusto 2012 okazis en Sicilio, en Mazaradelvalo Esperanto-Kongreso.

En ĝi partoprenis pli ol 300 esperantistoj el multaj landoj - ankaŭ 5 esperantistoj el glivice'a klubo.

Hotelo Hopps estis la kongresejo, la partoprenantoj ankaŭ loĝis kaj manĝis en ĝi. La ĉambroj estis oportunaj, la manĝaĵo bongusta kaj varia. La hotelo estis situanta ĉe la maro, en la korto troviĝis hotela naĝejo kiun la esperantistoj vizitis tre volonte pro la granda varmeco.

La solena inaŭguro okazis en bela salono de la Komunuma Konsilio. La festparoladon eldiris Barbara Pietrzak, ĝenerala sekretario de UEA.

Apud domo de la Komunuma Konsilio oni organizis esperantan ekspozicion. Ĉiuj prezentitaj esperantaĵoj estis el la kolekto de Stanisław Mandrak el Gliwice. La ekspozicio esitis bona promocio de Esperanto.

La programo de la Kongreso estis tre riĉa. Okazadis tri seminarioj: "Sed homoj kun homoj", "Muziko - internacia lingvo" kaj "Metodika Seminario pri lingvoinstruado", kurso de itala lingvo, E-kursoj je diversaj niveloj kaj multaj prelegoj.

Vespere oni povis partopreni en diversaj distraj programoj. La plej popularaj estis la koncertoj en la urbo, sur la placo Mokarta - ne nur por esperantistoj kaj ankaŭ por publiko. Dum la koncertoj kantis interalie: Jomo, Kajto, Jonas, Thorbjoern kaj Mathias, Piero Niskim, kaj Kimo.

Ĉiutage okazis ekskursoj en la vizitindaj lokoj de belega Sicilio. Glivice'anoj partoprenis en kvar ekskursoj.

La 79a Itala Esperanto-Kongreso estis tre interesa kaj bone organizita. Ni gratulas kaj tre dankas al organizantoj!

Krystyna Grochocka



GRUPE 2012

ESPERANTO



1887-2012

125 jaroj de Esperanto

GRUPE - 16

Glivice'a Rendevuo de Uzantoj kaj Praktikantoj de Esperanto

Gliwicka Randka Użytkowników i Praktyków Esperanta

9 - 11 novembro 2012



Kiel en pasintaj jaroj, novembre en Gliwice ni organizis aranĝon **GRUPE**. Ĝi estis jam la 16a aranĝo GRUPE-16. Nia aranĝo daŭris ekde la 9a ĝis la 11a de novembro 2012 en la sama loko kiel dum pasintaj jaroj.

En la kunveno partoprenis esperantistoj el Hungario, Brazilo kaj el Pollando.

Dum la malfermo nia prezidanto Stanisław Mandrak kore salutis la partoprenantojn kaj deziris al ĉiuj agrablan restadon en Gliwice.

Poste ni povis aŭskulti tre belegan koncerton de Anjo Amiko el Hungario.

Sabate kaj dimanĉe ni partoprenis en multaj prelegoj kaj en aliaj programoj.

Dum la aranĝo prelegis:

- Elżbieta Karczewska - "Książnica Białostocka kaj ĝiaj eldonaĵoj"
- Aleksander Zdechlik - "Internacia Esperanto-Sumoo"
- Jan Skonieczka - "Universala Esperanto Kongreso en Hanojo"
- Marlon Ribeiro - "Brazilo mia patrujo"
- Elżbieta Karczewska - "Promocio de Esperanto en Albanio"

Dimanĉe ni vizitis la Malnovan Urbon kaj rigardis la panoramon de Gliwice el turo de preĝejo al Ĉiuj Sanktuloj.

Dum la GRUPE 16 regis agrabla estoso, krom la programo ni havis okazon por babili, konatiĝi kaj amikiĝi. Ni esperas, ke la partoprenantoj estis kontentaj de nia rendevuo kaj venos al Gliwice denove.





Ekspozicio en Kędzierzyn-Koźle

Decembre, en nia urbo Kędzierzyn-Koźle, en Kulturdomo Chemik, kie funkcias Universitato de la Tria Aĝo ni organizis ekspozicion sub titolo "125 jaroj de Esperanto". Ĉi tie de kelkaj jaroj ĉirkaŭ 10 gesamideanoj renkontiĝas kaj lernas internacian lingvon - Esperanto.

Instigis preskaŭ 20-an personan grupon al lernado, sinjoro Stanisław Mandrak el Gliwice, tiu tempa prezidanto de PEA, kiu havis tre interesan prelegon, por niaj studentoj de UdTA pri Esperanto. Li ankaŭ estis nia instruisto, tre ofte kiel volontulo.

Bedaŭrinde, pro diversaj kaŭzoj nune restis nur duono da lernantoj - plej persistaj.

Raportis Stanisława Tobolewska



Kristnaska renkontiĝo

La 19an de decembro 2012 nia kunveno okazis ĉe la koleginino Wiesia. Ŝi invitis nin hejmen por solene festi sukcese finitan remonton. Renovigita loĝejo kaj abunde preparita per hejmmastrino vespermanĝo kun biero faris inter ni preskaŭ familian atmosferon. Ĉe kafo, teo kaj torto disvolviĝis konversacio. Etoso estis tre agrabla kaj bonhumora. La kunsido daŭris kelkaj horoj. Forirante ĉiuj gastoj bondeziris al la gastema mastrino kaj ĉiuj deziris al si reciproke Ĝojan Kristnaskon kaj Feliĉan Novjaron 2013.

Raportis Bohdan Rudawiec

